

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS^ŝ V^e

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. L. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono 5 frankoj, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono 7,50 fr.

Prezo de ĉiu numero: 40 centimoj; numero de la Kongreso: 60 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.



ELDONOJ

DE LA

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

(akcia societo

de diverslandaj Esperantistoj)

PARIS, 5^e

33, rue Lacépède, 33.

La dekstraj pli nigraj prezoj entenas la sendelspezojn.

Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Tute verkita en Esperanto, de P. FRUICIER. Klarigas aparte la uzadon de l'artikolo, verbo, participoj, tempoj kaj modoj, prepozicioj, ktp. Ebligas rapide akiri bonan stilon en Esperanto.

1 fr. 50. — 1 fr. 60.

Esperanta Versfarado, de TH. CART kaj PARISOT. Klarigas per ekzemploj tiritaj el la Esperanta literaturo, kiamaniere D-ro Zamenhof kaj la plej lertaj poetoj esperantistaj ritmigus siajn verkojn. Gvidilo por guadi la ĉarmon de la esperantaj versaĵoj. 30 cent. — 35 cent.

Frazlibro de l'Turisto, 400 utilaj frazoj en Esperanto por la vojaĝo kaj ĉiutaga vivado kun tradukoj angla, franca, germana, hispana kaj itala; resumo de la esperanta gramatiko en kvin lingvoj; adresaro de grupoj esperantistaj en la tuta mondo, k. a.; nova eldono (3-a), en presado.

(Daŭrigo sur la sekvanta pago)

ELDONOJ DE LA

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

(Daŭrigo)

Kurloza Sunhorloĝo, de S. POLJANSKIJ. Montras, kiel oni povas facile konstrui praktikan sunhorloĝon en ĉiuj lokoj sur la tero; kvar desegnaĵoj kaj tabeloj klarigas la tekston; *2-a eldono*.

20 cent. — **25 cent.**

Trafendita Turo, originala versaĵo en Esperanto kun franca traduko de TH. CART. Luksa broŝureto, vendata por la propagando inter blinduloj.

25 cent. — **30 cent.**

Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina? Artikoloj tiritaj el *L'Espérantiste*, france kaj esperante verkitaj de L. DE BEAUFONT; enhavas ĉiujn argumentojn kaj rebatojn pri la akcepto de latina lingvo kiel internacia; ebligas facile rebati la tiel ofte faratajn kontraŭdirojn.

60 cent. — **70 cent.**

Perdita kaj Retrovita, originala legendo en Esperanto verkita de E. BOIRAC, rektoro de la Dijona Universitato.

60 cent. — **65 cent.**

Edziĝo Kontraŭvola, unuakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de V. DUFEUTREL; — ludita en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer:

60 cent. — **70 cent.**

Homa Doloro, poemo originale verkita de FEZ.

30 cent. — **35 cent.**

Paŭlo kaj Virginio, de BERNARDIN-DE-SAINT-PIERRE, tradukita de H. HODLER.

1 fr. 25. — **1 fr. 45.**

Ruĝa Floro, rakonto de V. GARŠIN, tradukita de K. BOGUŠEVIĈ.

30 cent. — **35 cent.**

Sep Rakontoj, originale verkitaj en Esperanto, de IVAN MALFELIĈULO.

1 fr. — **1 fr. 15.**

Rolandkanto (*Chanson de Roland*), tradukita en Esperantaj versoj, de D-ro NOEL.

1 fr. 50. — **1 fr. 70.**

Grasa lignaĵisto, tradukita el itala lingvo, de G. CHAVET.

50 cent. — **55 cent.**

Elementa fotografa Optiko, de KARLO VERKS. Tiu verko montras kaj difinas la diversajn esprimojn teknikajn, kiuj estas kutime uzataj en fotografa optiko; — 1 broŝuro 12 × 19 cm. da 80 paĝoj kun klarigaj ilustraĵoj.

1 fr. 25. — **1 fr. 40.**

Oficiala protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto en Boulogne-sur-Mer

30 cent. — **35 cent.**

Esperanta Radikaro, de TH. CART, por blinduloj kaj neblinduloj. Entenas sen ia traduko la radikojn, kiuj troviĝas en niaj diversaj vortaroj. Tre oportuna libreto por lerni radikojn.

60 cent. — **65 cent.**

Instruado de Esperanto per bildaro, broŝureto kun ilustraĵoj, por ekzercoj de interparolado.

25 cent. — **30 cent.**

La Benkoj de la promenejo, de J. JOUY, tradukita de P. CORRET, Amuza tedmonologo.

20 cent. — **25 cent.**

Mallumaĵoj, rakonto, de ABONYI ÁRPÁD, — tradukita el la hungara lingvo de LENGYEL PÁL.

60 cent. — **70 cent.**

Les Mots Esperanto groupés selon le sens, par MARCEL BOBIN. 1 vol. 11 × 17 cm. de 130 pages.

1 fr. 25 — **1 fr. 35**

Notions élémentaires d'Espéranto et Exercices de Conversation, par TH. CART. — Vendu au profit de la propagande parmi les aveugles. — Deux fascicules.

25 cent. — **35 cent.**

AVIZO GRAVA. — Ni petas niajn klientojn, ke ili volu aldoni por la abonoj al gazetoj aliaj ol « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto », po 10 centimoj.

La poŝtmandatoj devas esti adresataj **ne** persone, sed al la **Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Parizo.**

Se nomo de poŝtofiĉejo por la pagejo estas bezonata, oni donu « **Bureau de poste N° 29, Rue Monge, Paris** ». Ni al-tiras speciale sur tiun gravan punkton la atenton de niaj klientoj anglaj kaj amerikaj; sen tiu sciigo, ni havas multajn mal-facilaĵojn por enspezi tiujn mandatojn.

PAUL DE LENGYEL sciigas siajn amikojn kaj korespondantojn, ke li ŝanĝis sian loĝejon, kiu nun estas: 15, *Rue Gracieuse*, — Paris (5°).

Juna, energia svedo (22-jara) deziras servon en fremda oficejo. Korespondas angle, germane kaj esperante. Respondo al BENGT LINDSTRÖM, *Diö*, Svedujo.

FLUGINTAJ REVOJ

Muzikverko, — duono soprano aŭ baritono, de PAUL WACHS. Teksto en Esperanto de A. GRABOWSKI.

Prezo 2 fr. — Ricevebla ĉe la

Preso Esperantista Societo

33, rue Lacépède, — PARIS.

★ INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. p. E., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj: 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12: 20 % . — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

S-ro PIERRE DÉRIBÉRE-DESGARDES, medicina kaj scienca studento, 76, rue des Saints-Pères, Paris, interesiĝante pri medicino, botaniko kaj fitoterapio, deziras korespondadi pri tio.

HELSINGFORS, Finlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

S-ro LOUIS PÉRIARD, *Auxerre* (Yonne) Francujo, deziras korespondi kun geesperantistoj, precipe fremdaj, per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

Le Creusot (Francujo). F-ino JANE DEBROSSE, deziras korespondadi poŝtkarte kun ĉiulanduloj. Ĉiam kaj tuj respondos.

Hjalmar Bäckström, *Saltsjöbaden*, proksime Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.

G. SUNDBERG, Bankoficisto, *Jönköping*, (Svedujo), deziras reprezenti respektindan firmon eksterlandan por vendo de ĝiaj produktaĵoj en lia lando.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

1 julio 1906

D^{ro} Cabanès. — Hazardo en la eltrovoj (trad. D ^{ra} PHILIPPET)	369
J. de La Fontaine. — Ĉikadino kaj Formikino (versaĵo, de A. GRABOWSKI).	376
Marcel Finot. — La Unuiĝo Poŝta universala .	377
G. Sand. — Fabelo (trad. P. SARPY).	380
Bagateloj.	380

Tra la mondo Esperantista :

Paul Fruictier. — La tasko de la Geneva Kongreso .	381
Gazetaro Esperantista	386
Diversaĵoj: Unua raporto de la Lingva Komitato. — Esperanto kaj Ruĝa Kruco. — Opinio. — Ni varbu maristarojn! — Por la francaj militistoj Esperantistaj. — II ^a Universala Kongreso de Esperanro. — Laste aperintaj verkoj	393

Nia aldono literatura (paĝoj 192-208) : **La reviviĝinta kanto**, de V. DANĈENKO (Trad. W. ERDMANN), *fino*.

HAZARDO EN LA ELTROVOJ

Eble estus troe pretendi, ke, ĉe la homaj eltrovoj, la ĉefrolo apartenas al la hazardo; tamen estas nediskuteble, ke ĝi tie ludas certan rolon. Kial oni nomus ĝin providenco de l'serĉantoj, se ĝi ne venus plej ofte al ili por helpo? Vere ĝi estas kunlaboranto, kiun oni deziras al si, sed kiu ekaperas en la momento, kiam oni ĝin atendas plej malmulte; kaj ĝia kunlaborado estas des pli ŝatata, ke ĝi estas ju malpli antaŭvidita.

En la sciencoj, en la utilaj artoj, en la industrio, en la terkulturo, granda nombro da eltrovoj estas alkalkuleblaj al la hazardo. La hazardo konigis la ecojn de l'kreskaĵoj, la efikon de l'plej multaj kuraciloj. La empirismo preskaŭ ĉiam antaŭiras la sciencon. Sed la empirismo, kio estas alia, en la plejmulto el la okazoj, ol simpla hazardo?

« Nenia hazardo estas en la mondo », ie skribis Joseph de Maistre, dum en alia loko de liaj verkoj, oni legas tiun ĉi frazon, kiu kontraŭdiras la unuan : « Ne nur estas falsa, sed evidente falsa la fakto, ke la krimo estas ĝenerale feliĉa kaj la virto mal-feliĉa. Kontraŭe estas plej evidente ke la bonoj kaj malbonoj estas kvazaŭ loterio, el kiu ĉiuj sendistinge povas elpreni bileton blankan aŭ nigran. »

Malplaĉas tamen al la prudento konsenti pri la tro absoluta propono de La Rochefoucauld, nome ke « l'hazardo kaj l'humoro regadas la mondon ». Same estus absurde nei, ke ekzistas « ia efikaĵo, kies kaŭzon ni ne distingas ». Nun, ĉu ĝi estas korpo aŭ spirito, ĉu ĝi estas estaĵo apartigita de l'aliaj estaĵoj kaj havanta apartan ekzistadon? Tiaj demandoj, kiuj priokupis La Bruyère, ne haltigos min. Mi nur volas pruvi per kelkaj ekzemploj okaze prenitaj el la historio de l'eltrovoj, ke la hazardo ne estas faktoro malŝatinda. Sed mi tuj aldonu, ke iafoje tute bezona estas vera genio, por ke oni povu profiti bonegajn eltrovojn kaj ĉerpi el ili ilian tutan valoron.



La elpenso de la « malluma kamero » alportas al ni pruvon pri tiu veraĵo, kiun aliaj historiaj faktoj poste konfirmos. Al J.-B. Porta, fizikisto de l'dek-sesa centjaro ni ŝuldas ĝin, oni ja scias. Li estis rimarkinta, ke la eksteraj objektoj desegniĝas kiel ombroj, sur la muro aŭ sur la planko de lia ĉambro zorge fermita, per trueto farita en la fenestra kovrilo kaj kiun la sunradioj trapasas.

Mirigite pro tiu stranga efikaĵo, li ekpensis meti ĉe l'ruo de sia fenestro vitraĵon lensoforman tia estis la deveno de l'*malluma kamero*. Sed nur, kiam oni igis facilportebla la aparaton servintan por tiu eksperimento, ĝi liveris ĉiujn antaŭsentitajn rezultatojn.



La aventuro okazinta al Galileo estas klasika ; oni legas en ĉiuj biografioj pri la glora astronomiisto ke, rimarkante la oscilan moviĝon de lampo alpendigita per ĉeno je l'supro de l'arkaĵo en preĝejo, li tiel ekpensis pri l'egaltempeco de l'pendolaj osciladoj. Li de tiam imagis la ideon almeti tiun econ al

la mezurado de la tempo kaj al la astronomiaj observadoj; sed nur post longa tempo li ĝin efektivigis.

Tion ĉi oni nescias pli ofte : nome, ke, ekinstruite de okaza cirkonstanco pri l'unuaj elementoj de la geometrio, li sentis en si decidigan inklinton al tiu scienco kaj de tiu tago li forlasis la legadon de Hipokrato kaj Galeno (ĉar liaj gepatroj estis unue difinintaj lin por la komerco, poste por la medicino) por tiu de Eŭklido kaj Arĥimedo.



Oni ĝenerale konsentas, ke Papin la unua havis la gloron konstati la potencon de l'vaporo kaj ĉiujn sekvaĵojn de ĝi devenigeblajn. Sed Papin havis antaŭulojn, estas tre juste sciigi tion. Arago konfesas kun la sincereco, je kiu li estas kapabla, ke la Grekoj kaj la Romanoj bone sciis, ke la akvovaporo povas atingi meĥanikan potencon miregindan kaj li rakontas anekdoton pri la arĥitekturisto de Justiniano, kiu igis danci la plafonojn de sia malamiko Zenono, per helpo de vaporo eliganta el kaldronoj plenigita je akvo; pri dio Busteriño, kies malplena kapo enhavis amforon da akvo laŭvole varmigebla kaj kies vaporo je fiksita momento bruege elĵetiĝis tra truoj fermitaj per lignaj ŝtopiloj : tio nepre miregigis la fidelulojn surgenuajn. Poste Arago rakontas la fakton sekvantan, kiu neniel estas legenda kaj kiu helpas al la subteno de mia tezo :

« La markizo de Worcester, el la glora Somerseta familio, implikite en la konspiroj de la lastaj jaroj de la Stuarda reĝado, estis enfermita en la Londona turo.

« Ian tagon, laŭ la tradicio, la kovrilo de l'bolpoto, kie li kuiris sian vespermangaĵon, sin levas subite. Kio konvenus en tia loĝejo krom la pripensado? La malliberulo pripensis la strangecon de l'fenomeno, kiun li ĵus vidis.

« Tiam li ekpensis, ke la sama forto, kiu levas la kovrilon, povas fariĝi en iaj cirkonstancoj utila kaj oportuna movilo. Reliberiĝinte, li montris, en la jaro 1663a, en libro titolita *Century of Inventions* (centjaro de elpensoj), la rimedojn, per kiuj li intencis efektiviĝi sian ideon ». Nur al li mankis la efektivigo de lia aparato. La hazardo estis servinta lin, sed li nesciis ree servi la hazardon.

Vidu kontraŭe Newton : sufiĉas, ke li vidu antaŭ si pomon

falantan, por ke li, okaze de tiel ordinara fariĝo, elpensu la ideon pri la universala gravitado kaj la sistemo de l' mondo. Sed Newton ne kontentigis observadante, li meditis kaj senĉese meditatis. De li estas la jena respondo al iu demandinta lin, kiel li sukcesis fari siajn eltrovojn: « Pensante ĉiam pri tio! »

Pli afektema estis, sub ŝajna modesteco, samlandulo de Newton, ĥemiisto Priestley, kiu fanfaronis, ke li ja trafis la saman celon per kontraŭa vojo pensante pri tio neniam. Priestley malkonfesis, ke li estas ĥemiisto kaj li certigis, ke lia nescieco pli utilis al li ol lia scienco. Li nur faris eksperimentojn, provojn je l'okazo, sed li atendis de la hazardo la solvon de l'problemoj, kiujn li fervore persekutadis (1). Laŭ lia diro, dank' al ia okaza cirkonstanco li eltrovis l' oksigenon.

Li akompanis la markizon Lansdowne en Parizon kaj uzis la okazon por iri kunsidon de la scienca Akademio. Tiun tagon, oni tie disputadis pri la ecoj de la ruĝa oksido de hidrargo. La disputado, kiun partoprenis inter aliaj fizikisto Baumé kaj ĥemiisto Cadet estis plej vigla. Reveninte hejmen, Priestley ekkontrolis la certigojn de ambaŭ disputintoj, por krei al si opinion, kaj tiel ekaperis al li, la unuan de Aŭgusto 1774, nova elemento, kiu estis nomata « oksigeno ».



La jena rakonto, pli fantazia, tamen ŝajnis kredinda al spiritoj ordinare seriozaj.

Oni scias, ke oni alkalkulas al Montgolfier, se ne la ideon pri la supreniro de l' aerostatoj, almenaŭ l'unuan efektivigon de tiu ideo. Nu, al Sino Montgolfier, aŭ pli ĝuste al dio Hazardo, ni kredeble ŝuldas tion.

La edzino de aerveturonto estis metinta subjupon sur unu el la salikaj korboj kiuj servas por la sekigado de l' tolaĵo, per fajrujo lokita en ilia centro; ĉar la varmo maldensigis l'aeron, la subjupo levigis supren. Montgolfier estis impresata

(1) Okaze estis eltrovitaj la pafilega pulvo, la minio (de la atenano Kaliaso, kiu klopodis fabrikadi oron per sablo kaj argento), la kupela provo, la fosforo, la arseniko, k.t.p. de alĥemiistoj serĉadantaj la filozofan ŝtonon.

de tiu fenomeno, kiu estus nerimarkita de iu alia (1) kaj tiamaniere la aerostato varmaera estis eltrovata.



La eltrovaĵo, kiu famigis la nomon de Galvani, estis, kiel tiom da aliaj, efikaĵo de l'hazardo, tiu mistera estaĵo, kiu eble nur estas, kiel oni diris, sekreta agento de l' Providenco.

Iam la fizikisto estis metinta sur tablo, apud elektra maŝino, ranojn senhaŭtigatajn, el kiuj, oni estis faronta buljonon. Iu lernanto ekpensis alproksimigi pinton de skalpelo al la femuro de unu el la ranoj; tuj ĝi sentis fortajn konvulsiojn kaj ŝajnis revivigita.

Alia lernanto rimarkis ke tia efikaĵo okazas en la momento, kiam brilas fajrero el la konduktoro de l'elektra maŝino. Galvani, kiu estis tiam okupata aliloke, estis sciigata pri la ĵusa okazintaĵo; li refaris la eksperimenton, kiu liveris la samajn rezultatojn. Li diversigis ĝin milmaniere kaj fine eltiris el ĝi la teorion pri l'elektro animala. Laŭ li la fenomenoj de muskola kuntiriĝo observitaj devas esti alkalkulataj al ia speciala elektro, neapartigeble alligita al nia organismo kaj polusiganta en la nervoj kaj muskoloj. Tiamaniere ĉia fibro prezentas kvazaŭan Leyde an botelon, kies konduktoroj estas la nervoj. La fluaĵo, altirita el la muskoloj en la nervojn, poste iras de tiuj ĉi sur la supraĵon de l'unuaj, tiel ke je ĉiu malŝargiĝo de tiu elektra organika aparato, fariĝas kuntiriĝo en la muskolfibroj: de tio rezultas la fenomeno de l'vivo.

Ni ne provos revivigi la flamajn disputadojn, kiuj sekvis tiajn dirojn; ni nur rememorigos ke, kelkajn jarojn antaŭ Galvani, scienculo el Napolo, Cotugno estis kun miro rimarkinta, ke, kiam lia skalpelo tuŝis la diafragman nervon de muso sekata de li, tiu ĉi muso produktas sufiĉe da elektro por doni al

(1) Io sama okazis al la fotografado aŭ pli ĝuste al la « dagereotipio », kies patreco tiel juste apartenas al Niepce kiel al Daguerre. Niepce kiu, same kiel Newton, « ĉiam pensis » pri sia eltrovo, ekvidas argentan kuleron, kiu, kuŝanta sur plato akvumita per solvaĵo jodida, estis tie lasinta postsignon. Iu alia ne estus miregigita, sed por Niepce tio estis genia elmontriĝo. « La jodo, li pensis, do povas igi metalon alirebla por la figuroj. » La plej granda paŝo estis farita.

la mano skuon, kiu iom rigidigas ĝin. Sed Cotugno nenian konkludon eltiris el tiu fakto, kiun li poste rakontis, kiam Galvani estis elmontrinta al la scienca mondo la eltrovon, kiu devis senmortigi lian nomon.



Ni ĝis nun parolis nur pri sciencaj eltrovoj; sed ne nur la scienco profitis la hazardon, la industrio ankaŭ ŝuldas al ĝi.

Mi ne sciigos al vi, ke la *facetigo de l'diamanto* datumas de l'dekkvina centjaro: ĉiuj enciklopedioj povas informi vin pri tiu ĉi punkto; ĉiuj biografistoj al vi diros, ke Ludoviko de Berquem, naskiĝinta en Bruĝo, ekpraktikis ĝin jam en 1476. Sed ili ne aldonas, ke en li la ideo ĝermis plej nature; li estis vidinta, ke du diamantoj donas deskrapaĵojn, se oni frotas unu kontraŭ la alia. Tio sufiĉis por naski ĉe li la ideon pri ilia polurado kaj facetigo.

Same la arton de l'malkaraj perloj ankoraŭ eltrovigis la hazardo.

En 1686, fabrikisto de rozarioj sur strato Petit Lion, en Parizo, vidante sian servistinon preparantan blankfiŝetojn konstatis, ke la skvamoj lasas sur la akvo kruston brilan kiel perlamoto. Tiu simpla observado igis lin enpaŝi la bonan vojon, tamen lia eltrovo nur estis plena, kiam li trovis rimedon solvigi la fiŝajn skvamojn en alkala solvaĵo (1). Li tiel ricevis la miksaĵon, kiu, sub malĝusta nomo « orienta oleo », liveris de tiam la precipan elementon por la fabrikado de nenaturaj perloj en Franclando.



Ankaŭ al la hazardo la porcelana industrio ŝuldas sian ekiradon antaŭen (2).

(1) Je l'komenco oni uzadis urinon; oni lasis kelkatempe trempadi en ĝi la fiŝon, kiun oni poste kuiris kaj prezentis en la malkaraj restoracioj. Tio ja ne estis alloga!

(2) Al la hazardo devas estis alkalkulata la arto tranĉadi ŝtonojn almeti ringojn ferajn ĉirkaŭ la aksingoj, tani felojn, briligi silkon,

Ekzistis ne malproksime de urbo Limoges, en St-Yrieix, mino da blanka tero grasuma, kiu ĝis tiam ne estis rimarkita. L'edzino de tiea ĥirurgiisto, Sr^o Darnet, ekpensis iam uzi ĝin por purigi sian tolaĵon; ŝia edzo, mirante pro la ŝajno de tiu argilo, sendis iom da ĝi al unu el siaj amikoj, apotekisto en Bordeaux, kiu, analizinte ĝin, ne dubis, ke tio estas kaoleno, kiu estis venigata el la fremdaj landoj, antaŭ tiu eltrovo. Li tamen juĝis konvena, por iĝi pli certa, raportu pri tio al kompetenta ĥemiisto kaj al la glora Macquer, ano de la Sciencia Akademio, li transdonis la specimenon.

Tiu ĉi iris Saint-Yrieix, faris elprenojn kaj post unu jaro da eksperimentoj povis anonci al siaj Akademiaj Kolegoj, ke de nun estas senutile, ke oni serĉadu tiel malproksimen tion, kio estas trovebla en nia propra lando kaj je kondiĉoj multe pli gajnigaj. De tiu tago datumas la famo de la Limoges'a porcelano kaj de tiam tia famo apenaŭ malpliigis.

Oni demandas sin ofte, kiamaniere la grandaj riĉecoj formiĝas. Estu certaj, ke la ŝanco tie ludas gravan rolon.

En 1819, Day nur estis malfeliĉa kaj senfama barbiro en la Londona « City ». Soldato pasanta antaŭ lia butiko petas de li kelkajn ŝilingojn por elfino de sia vojiro; kompateme Day donas ilin; interŝanĝe la soldato lasas al li recepton pri ia ciro... Kelkajn jarojn poste, la malriĉa barbiro posedis palacon konstruitan dank'al la profitoj ricevita de l'vendo de tiu ciro, kies sekreta konsisto estis malkovita al li de l'hazardo (1).

Mi longatempe plilongigadus tiun revidon de l'eltrovoj, se mi volus ĉe ĉiuj retrovi la rolon, kiu apartenas al la hazardo (2). Sed mi sufiĉe jam diris por pravigi ĝin kaj tio kontentigas mian ambicion.

Kiel diris Gerdý, en la medicina Akademio, en ĝia kunsido de la dekseca de aprilo 1855, pri nova metodo operacia, kiun li ŝuldis al la hazardo, « en ĉiujn eltrovaĵojn la kazarado zorge enmiksigas, por ke oni sukcesu. Oni pensas ian tagon, pli bone ol oni povus fari la tagon antaŭan aŭ la sekvantan, pri la rimedo,

(1) Day testamentis al siaj heredontoj 12.250.000 frankojn.

(2) Al la hazardo mi devas alskribi la eltrovon de l'vitro, speguloj, desegno, gumo, kompaso kaj de l'plejmulto el la kontinentoj ĝis tiam nekónataj, k. t. p. Kaj ĉu de l'hazardo ne devenas preskaŭ ĉiam la arĥeologiaj eltrovaĵoj?

kiu ne estus ĝerminta en la spirito je alia ajn momento. » Nenio estas pli ĝusta kaj tio pravigas la jenan Ciceronan parolon : Se estas vere, ke la hazardo helpas al la fortuloj, precipe la prudento donacas al ili novan forton per siaj konsiloj. » (El *La Vulgarisation scientifique*, Doin eld. Parizo).

Dr^o CABANÈS.

(Esperantiĝis Dr^o G. PHILIPPET).

CIKADINO KAJ FORMIKINO

(El: J. de La Fontaine.)

Kantis dum somer' sen fin'
 Cikadin' ;
 Sen provizo sin ektrovis,
 Kiam frosta vent' ekblovis ;
 Sen malgranda eĉ pecet'
 Da muŝet'o aŭ vermet'.
 La malsato pelis ŝin
 Al najbara formikin'.
 Kaj ŝi petis kun insisto :
 « Donu grajnojn por ekzisto
 Ĝis la nova jar'-sezon' ;
 Mi vin pagos, laŭ ordon',
 En Aŭgust', pro l' best'-honoro,
 La procenton kun valoro. »
 Nepruntem' de l' formikino
 Malpli granda mank' en ver' ;
 « Kion vi faris dum somer' ? »
 Diris ŝi al pruntantino.
 — « Tagon, nokton al venantoj, —
 Ne mallaŭdu — kantis mi. »
 — « Kantis ? — gaja jen meti' !
 Nun, ekdanĉu post la kantoj.

{*Varsovio*}

A. GRABOWSKI.

LA UNUIĜO POŜTA UNIVERSALA

De la tago kiam, en Franclando, la transporta pago de leteroj estis malgrandigita, ĝi estas interne de preskaŭ ĉiuj grandaj landoj samvalora. Tio estos sendube grava progreso, sed ĝi estas ankoraŭ nesufiĉa. Tiu unua sukceso ekscitis nian glormecon, kiu jam plue petegas, kaj ĝi estos kontenta nur la tagon — pli malpli proksiman — kiam la poŝtpago po 10 centimoj estos sufiĉa ne nur interne de la limo de ĉiu lando, sed ankoraŭ transe, sur tuta civiliza universo.

Vane proponita en kongreso de Romo, de delegitoj de Nova-Zelando, de Egiptlando kaj de Aŭstralio, tiu reformo ne sendube estos efektivigita morgaŭ. Sed estos necesa ke tio ian tagon okazos, ĉar oni ne povas ŝanĝi la logikon de okazintaĵoj; ĉio, kion kutimo povas fari, estos prokrasti la tagon de venko, sed malgraŭ ĉio tiu tago alvenos, kaj oni miras, ke jam de longe oni ne estis solvinta tiun problemon tiel simplan.

Al ni ŝajnas hodiaŭ tute natura ke oni povu korespondadi per vojo poŝta kun kia ajn punkto de globo, por pago identa kaj malgranda, kaj oni kredus volonte ke tio ekzistis ĉiam.

Kaj tamen dum multaj jaroj oni batalis pri tiu simpla afero, kun prokrastoj, enuoj, elspezoj kiuj estus senkuragiĝintaj nian nunan homaron, tiel senpacienca; neniu pensis tiel praktikan solvon kiun oni fine akceptis.

Kaj ankoraŭ post kiam homo, kies oni devus trompeti nomon per trompeto de Famo, kaj enskribi per oraj literoj sur la libro de homara bonfareco, estis trovinta racian solvon de la afero, li devis multe laboradi por sukcesi, per energio, fido, persisto, sindoneco kaj diplomatio, trudi ĝin al malkuraĝuloj kaj malamikoj de novaĵoj, kaj fine krei internacian institucion oficialan kaj regulan.

★

★ ★

En jaro 1855 efektive, humila oficisto de poŝto de Danujo, JOSEF MICHAELSEN, eltrovinta la projekton el kiu devis naskiĝi la Unuiĝo Poŝta, sendis unuan fojon proponon pri tio al registaroj de diversaj landoj. Li sukcesis feliĉe konvinki altan oficiston germanan, HEINRICH VON STEFAN, eltrovinton de la poŝta karto, kiu, dank'al siaj gravaj konatuloj kaj sia influo, permesis ke li fine venku. Sed la patreco de l'ideo apartenas tute al J. MICHAELSEN: li mem estis kreinta, pli perfektiginta, kaj sola estis batalinta, de 1859 ĝis 1874, por ke ĝi prosperu. Kaj se hodiaŭ ni povas skribi por 25 centimoj — la 25 centimoj legendaj de voja-

ĝadanta Hebreo — de unu al alia punkto de globo, ni ja ĝin ŝuldas al tiu brava dano.

Vere oni ĵus estis al di dankema. La eltrovinto de la Unuiĝo Poŝta, hodiaŭ pli ol okdekjara, estis fine rekompencita, kaj antaŭ ol li mortis, li havis lastan kontenton vidi sian portreton en museo de Frederiksborg, inter tiuj de danoj kiuj bone laboris por lia patrujo.

Kaj ne nur por dana patrujo, sed por tuta homaro, por civilizacio li laboris, por tiuj kiuj en ĉiuj laudoj skribas kaj ricevas leterojn.

Pripensu nur unu momenton, kaj provu vidi tion, kion okazus, se malaperus Unuiĝo Poŝta kaj se ni devus rekomenci malfacilaĵojn de la antaŭa stato; kaj tiam ni povus mezuri la gravecon de la eltrovo de MICHAELSEN.

Se la bankistoj de Parizo, Londono kaj Nov-Yorko, — se ni volas nur pri tiuj paroli — estus, de la 1^a julio 1875, donintaj nur unu centimon por unu franko gajnita, al MICHAELSEN, kiu dum tuta sia vivo estis tre malriĉa, li estus hodiaŭ tiel riĉa kiel la plej riĉaj milmilionriĉuloj de Ameriko.

Sed ne nur por la financo kaj komerco tiu eltrovo estis utila. Pli grava, pli fruktoporta estis lia laboro. La vero estas ke li pli laboris, por unuiĝo de ideoj, por universa paco kaj frateco de homaro, ol ĉiuj eltrovintoj, ĉiuj ekonomistoj, leĝdonantoj kaj filozofoj; ĉiu paŝo marŝita al idealo ankoraŭ malproksima estas konsekvenco de lia penado kaj alportos al li iom pli da gloro.

★

★ ★

Aldonu ankoraŭ ke la konkludo de unua projekto de JOSEF MICHAELSEN estis kreo de sola poŝta takso, valora tiom inter du landoj, kiom interne de kia ajn lando; de la komenco de sia kuraĝa batalado, li jam montris la ideon de la reformo kiun ni ankoraŭ hodiaŭ petegas.

En malofta verketo dekdupaĝa, en jaro 1859, li tion ĉi klarigas; li montras kiel nenia kaŭzo estas por ke oni pagu pli kare por sendi leteron de Parizo al Kopenhago, ol de Parizo al Lyono; kaj utilo ekonomika, politika, kaj sociala postulos ke tiam ekzistu nur unu unuforma takso, sendependa je interspaco kaj nacio.

« La poŝtaj vojoj, li diras, ekzistas jam vere. Estas necesa ke la servo de internaj poŝtoj estu kreita, kaj la pligrandigo de elspezoj administraciaj kiu rezultus el pligrandigo de internacia korespondado estus repagita sendube, ĉu rekte per la takso interna kolektika el multo kreskanta de leteroj, komi-

siitaj en lando mem por eksteraj landoj, ĉu malrekte, per senpaga transporto sur ekstera lando de leteroj de patrujo.

« Je la vidpunkto de la nacia ekonomio, neniam rekta ŝanĝo okazos: ĉiu lando transportos senpage la depeŝojn de kia ajn alia, kaj kontraŭe tiu lasta ricevos senpagan transporton de siaj leteroj; kaj se oni supozas ke ĉiu letero petas kaj ricevas respondon, oni povas konkludi ke unu servo kompensas alian, kaj neniam nacio estos malfavorita de alia...

« ... La multo da laboristoj kaj landanoj komprenos dankeme la gravan bonfaron kiun oni al ili donas, dank'al novaj vojoj kiujn la registaroj estos kreitaj por industrio, uzante tiun fortegan rimedon por alproksimigi unu al alia, por utilo de paco kaj civilizacio, tiun parton mem de nacioj kiu laboras por sia vivo ».

Tamen, kiam J. MICHAELSEN tiel parolis, oni ne estis ankoraŭ preta por lin kompreni. Oni ne pli lin komprenis en 1875, kaj la kongreso de Berno konkludis aliamaniere kaj plenumis nur unu duonon de la reformo; kaj, sen ia kaŭzo, oni decidis ke la kosto de internacia takso estos duobla de interna takso.

De tiu tago, oni pri tio pripensis, kaj oni ne komprenas kial oni ne ĝeneraligus la sistemon kiun Anglujo kreis por sia tuta kolonia imperio, sen ia malutilo.

Ĉiuj, kiuj timas la venkontajn malfacilaĵojn, pensu ke, kiam MICHAELSEN sen rilatoj, sen alia rimedo ol konfido en vereco de sia afero, entreprenis tiun gravan laboron, multe pli grandaj estis la malfacilaĵoj, multe pli timindaj. Tio kio estas farota estas nenio, kompare al tio kio estas farita.

Sed, kiam ĉio estos farita, kiam tiu lasta takso estos forgesita, kiel la malnovaj unuaj taksoj, ni neniam devos forgesi ke la plej granda parto de gloro estos ŝuldata al tiu maljunulo genia, kiu, de jam 50 jaroj, havis ideon krei Unuiĝon Poŝtan.



Ĉu tiu historio ne estas tiu de Esperanto mem? Ĉu la unuaj malfacilaĵoj ne estis tiom gravaj; ĉu la indiferento de homaro ne estis tiel granda, ĉu la genia homo kiu eltrovis tiun mirindan idiomon ne ricevis ridojn, mokojn kaj malamikaĵojn? Kaj tamen, kiel la ideo de MICHAELSEN, tiu de ZAMENHOF per grandoj paŝoj marŝis, kaj fini ĝi venkos la mondon.

Marcel FINOT.

VI Bagateloj

La oficistoj estas kiel la libroj de biblioteko. La plej alte metitaj estas tiuj, kiuj plej malofte servas.

Antaŭdatumita reklamo.

Oni disdonis antaŭ kelkaj semajnoj sur la bulvardo, la jenan vizitkarton :

A B C
tajloroj

Vestas la estontan prezidanton de la Respubliko

Antaŭ ol iri tagmanĝi ĉe amikoj :

Sinjoro : Nu ! amiketino, rapidu vin vesti, ni ne alvenos ĝustatempe !

Sinjorino : Rapidi ! Sed jam de du horoj mi rapidas.

Vera vorto de infaneto.

— Kiel, Bobino, vi volas ankoraŭ kremon ? — Sed, vi jam manĝis plenan kuleron !

— Jes, patrineto, sed mia kulero estas tiel malgranda... !

Fabelo.

Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis bonan feinon, kiu kuris kiel frenezulino, kvankam ŝi estas tre maljuna.

— Kial do vi tiel rapidas por forlasi nin, Sinjorino Feino ?

— Ne parolu al mi pri tio : jam longe mi ne estis vidinta vian malgrandan mondon, kaj mi jam nenion komprenas pri ĝi. Mi prezentis la belecon al la junuliĝoj, la kuragecon al la junuloj, la saĝecon al la maljunuloj, la sanecon al la malsanuloj, kaj ĉiuj rifuzis mian donacon, demandante ĉu mi havas monon ! Nu mi foriras, ĉar mi timas, ke la rozoj ankaŭ petos de mi juvelojn aŭ ke la papilioj pretendos kaleŝe veturi sur la herbejo.

— Ne, Sinjorineto mia, ne, — diris, ridante la malgrandaj rozoj, kiuj aŭdis la plendon de la feino, — ni havas gutojn da roso sur niaj folioj.

— Kaj ni —, diris la papilioj, — ni havas oron kaj arĝenton sur niaj flugiloj

— Jen estas, — diris la feino, forirante, — la solaj saĝaj estaĵoj, kiujn mi lasas sur la tero.

El. G. SAND.

tradukis P. SARPK.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

La tasko de la Geneva Kongreso

En antaŭa artikolo ni vidis, ke ni devas, por bone organizi la Genevan Kongreson, imiti la Boulogne'an. De tio ni konkludis, ke la ĉefa tasko kaj celo de Esperantista internacia kongreso povas kaj devas esti precipe la propagando de la lingvo per festoj, ludoj, koncertoj, teatraĵoj, k. t. p.

Tio ĉi ne estas tamen la sola rolo de tiaj internaciaj festoj, kiujn oni nomis tre malĝuste « kongresoj ». Tiu solenaj kunvenoj povas havi ankaŭ alian tre gravan influon al la vivado de Esperanto, *konservante la unuecon de la lingvo en ĉiuj landoj*. Efektive kiam miloj da Esperantistoj el plej diversaj lingvoj renkontiĝas kaj kune vivadas dum kelkaj tagoj, ili pli-malpli konscie korektas unu la alian kaj helpas al starigo de vera internacia elparolado, internacia stilo, internacia spirito de la lingvo. Ekzemple, la Boulogne'a Kongreso instruis multajn Francojn pri tio, kio estas la akcento en Esperanto. Multaj samideanoj, kiuj elparolis tre malbone la lingvon antaŭ la Kongreso, tre ŝatinde progresadis post ĝi; tion mi konstatis, revidante antaŭ-nelonge Esperantistojn el Boulogne. Same estos verŝajne pri la intima uzado de la lingvo. Oni ne povas dubi, ke oftaj internaciaj kunvenoj havos en tiu ĉi rilato tre gravan influon al la konservado de nia lingva unueco, sen kiu ne povas ekzisti lingvo internacia.

Tiu bona efiko de la Boulogne'a Kongreso cetere ne estis la sola en tiu ĉi rilato. La Kongreso ja, krom la propagando, ankaŭ faris utilegan laboron, akceptante — post korektado — la *Deklaracion pri Esenco de Esperantismo* (1), kiu estas nun nia fundamenta leĝo. Antaŭ la Kongreso jam ekzistis, inter D^{ro} Zamenhof kaj la Esperantistaro, ia efektiva — kvankam ne skribita — *kontrakto*. Laŭ tiu kontrakto, unuflanke *la aŭtoro de Esperanto proponis lingvon, kiun li ne havas plu rajton tuŝi nek ŝanĝi post ĝia eniro en la mondo*; aliflanke *la Esperantistoj*

(1) Unu folio kvarlingva, *Preso Esperantista Societo*, Paris.

akceptis tiun lingvon senŝanĝe kaj — ne aŭskultante sian propran, privatan preferon — promesis disvatigi kaj uzadi ĝin sen-difekte.

La Boulogne'a Kongreso konfirmis tiun prudentan kaj saĝan kontrakton kaj donis al ĝi, laŭ la propono de Dr^o Zamenhof, formon « aĵecan », materian. Efektive, en Boulogne oni akceptis solene : 1^e la Deklaracion; 2^e Lingvan Komitaton por helpi Dron Zamenhof en la gvidado de la Esperantistoj konsiderataj, kiel lingvanoj. Samtempe kun tiu akcepto komenciĝis nova periodo por Esperanto, kaj oni povas prave diri, ke en aŭgusto 1905-a, Esperanto ricevis sian Sinaj'an Konstitucion.



Nun ni esploru tion, kion entenas tiu fama Deklaracio, kiun ĉiu Esperantisto devus preskaŭ parkere scii, por meriti la nomon « Esperantisto ».

La du unuaj artikoloj difinas la « Esperantismon » kaj celas pli la ne-esperantistojn, ol la esperantistojn mem. La tria artikolo koncernas la liberecon de ĉiuj Esperantistoj : ĝi staras ekster nia hodiaŭa temo. Sed la kvara artikolo enhavas ion, kio interesas nin en la plej alta grado. Tial mi devas ĝin tie ĉi represi laŭvorte :

« Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniun aparta homo ; ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute *privatan* kaj por neniun devigan. La sola unufojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo « Fundamento de Esperanto » en kiu neniun havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj « tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto » Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo, al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton. »

Oni vidas facile, esplorante tiun tekston, ke ĉiu vorto

estas zorge pesita de Dr^o Zamenhof; ĝi estas vera, neevitebla, truda leĝo, deviga por ĉiuj Esperantistoj senescepte, eĉ por la aŭtoro mem de la lingvo: « Neniu havas la rajton fari ŝanĝon », kaj se iu dekliniĝas de la « Biblio » li ĉesas *ipso facto* esti vera Esperantisto laŭ la difino entenata en la Deklaracio: Esperantisto estas nur tiu, kiu obeas la Fundamenton.

Kiel forta estas tiu leĝo, kiel simpla kaj facila, kaj tamen kiel efika por konservadi en la estonto la unuecon de la lingvo, de ĝia stilo kaj de ĝia komuna vortaro!

La disputado okazinta en la kongreso mem, kiam estis proponata la Leĝo, ankaŭ estas komentario, kiu pli fortigas ĝin. Mi memoras, ke Dr^o Zamenhof unue ne volis eĉ, ke oni korektu en la Vortaro de la Fundamento la malĝustajn naciajn tradukojn aŭ tipografiajn preserarojn, timante, ke en la estonto oni pretekstu tion por enŝovi ian ŝanĝon en la lingvon. Nur ĉar Sr^o Boirac, Sr^o Moch kaj kelkaj aliaj kongresanoj diris, ke ili ne povas promesi, ke ili respektos « materiajn erarojn », Dr^o Zamenhof konsentis, ke la preseraroj kaj tradukeraj vortoj povos esti reĝustigataj en la teksto mem de la Fundamento, anstataŭ esti simple montrataj per aldono al la libro, kiel estis proponita (1).

Dum tiu disputado, iu citis la vortojn de Dr^o Zamenhof, ke « la lingvo devas resti netuŝebla » kaj montris al la « Antaŭparolo » de la fundamento, kie estas dirate: « Kiel aŭtoro de la lingvo, mi pli ol ĉiu alia volus, ke ĝi estu kiel eble plej perfekta; por mi la retenigado de plibonigoj estas pli malfacila ol por ĉiu alia kaj mi konfesas, ke kelkajn fojojn mi estis preta proponi al la Esperantistoj kelkajn malgrandajn plibonigojn; sed ĝustatempe mi ekrememoris pri la granda danĝero de tia paŝo kaj mi forĵetadis mian intencon ».

(1) Iu samideano demandis, ĉu tia neŝanĝebleco de lingvo estas akordebla kun leĝo de l'evoluo, ĉar, li diras, « nur la mortintaj lingvoj ne ŝanĝiĝas, kaj la karaktero de vivanta lingvo estas ĝia evoluigo ». Oni povas rebati, dirante, ke kio ŝanĝiĝas en vivanta lingvo, tio ĉi estas la vortoj kaj esprimoj, sed ne la esenco, la spirito, la konsisto mem de la lingvo. Tiun *naturan evoluigon* ebligas la Deklaracio, difinanta, ke ĉiu Esperantisto povas krei la novajn vortojn necesajn « kiel en ĉiu alia lingvo ». Sed tio, kion malpermesas la nuna kontrakto, estas la *nenatura evoluigo*, kiun tro ofte privataj personoj volus altrudi al ĝi nur por kontentigi personan guston.

Tiam D^{ro} Zamenhof diris : « Nenia ŝanĝo povos esti farata antaŭ ol Esperanto estos oficiale akceptita de registaroj de sufiĉe gravaj Eŭropaj regnoj, aŭ almenaŭ de iu oficiala aŭtoritato kapabla ĝin trudi al la tuta mondo. Se tiam la diritaj registaroj postulas ian plibonigon por akcepti nian lingvon, kompreneble ni ĝin faros; sed ni ĝis tiu tempo ne devas ŝanĝi eĉ unu vorton en la Fundamento » (2).

Sekve nenia dubo povas ekzisti pri la grandsignifeco de la Deklaracio kaj ĝia devigeo por ĉiu Esperantisto : la teksto mem de la Leĝo, kaj, krom tio, la pridisputado en la Kongreso, kune pruvas tion, ke neniu povas fariĝi. Esperantisto aŭ restadi Esperantisto, se li ne obeas severe la kontrakton solene subskribitan de Doktoro Zamenhof kaj de l'Esperantistaro; se li ne obeas la regulojn aŭ ne imitas la modelojn entenatajn en la Fundamento de Esperanto.



Post difino de tiel fortika, tiel preciza Leĝo, la Kongreso faris ion plu : ĝi aplaudis unuanime la fondon de Lingva Komitato starigata de D^{ro} Zamenhof por lin helpi en la konservado de la Leĝo kaj gvidado de la natura evoluigo de la lingvo. Ĉirkaŭ cent Esperantistoj, elektitaj el la plej fervoraj kaj konataj samideanoj, formas nun ian kvazaŭ flaggardistaron, kies devo kaj celo estas konservi sendifekte nian Fundamenton kaj gvidadi la ceterajn Esperantistojn en la lingva uzado, por ke en la Esperanta vortaro kaj sintakso ĉiam restadu la internacieco, la konstanteco kaj la unueco necesaj por ĝia vivo.

Nu, tiu faro de la Boulogne'a Kongreso estis grava kaj bonega. Post ĝi, ĉiuj samideanoj povis disiri gaje kaj kontente, kredante ke la unueco de Esperanto estas por ĉiam certigita. Sed jam aperas, ke la impreso farita ne estis sufiĉe daŭrema, kaj al mi ŝajnas nepre necesa, ke la Geneva Kongreso denove konfirmu kaj sankciu la decidojn faritajn en Boulogne.

Mi ne volas pretermezure longigi tiun artikolon. Tial mi ne raportos detale ĉi tie pri la faktoj, kiuj pruvas la necescon de tia rememorigo pri la netuŝebleco de la lingvo. Mi volas

(2) Bedaŭrinde nenia raporto ĝis nun eldonita pri la kongreso, detale publikigis tiun gravan diskutadon.

paroli nek pri la ŝanĝoj de prepozicioj proponitaj, nek pri la disputoj rekomencitaj en la Lingva Komitato mem pri la ŝanĝo de nia alfabeto! Nur unu fakton mi mallonge citos por montri, kiom malmulte — bedaŭrinde — eniris la kapon de kelkaj Esperantistoj la ideo pri la neŝanĝebleco de Esperanto. En Parizo, la direktoro de unu fame konata supera lernejo nacia (ŝtata) diris al membro de la Lingva Komitato « Se vi certigas al mi ke oni ne faros ŝanĝojn en Esperanto, mi morgaŭ komencos oficialan kurson en mia instituto ». La membro de la Lingva Komitato — kiu verŝajne deziras ke estu farataj ŝanĝoj — respondis : « Ne, mi ne povas certigi tion ». Kaj la kurso ne fariĝis, bedaŭrinde por nia afero, kiu estus ricevinta de tio preskaŭ sian plej grandan puŝon ĝis nun atingitan en Francujo.

Nu, al mi ŝajnas, ke la Esperantistaro devas, en Genevo, energie montri al la Lingva Komitato, ke ĝi havas pli utilan kaj pli urĝan laboron, ol disputadi pri aferoj tute fiksitaj kaj difinitaj de la Fundamento. La dua Kongreso devas solene kaj absolute eldiri, ke nenia ŝanĝo estos farata en Esperanto — krom la okazo se regna registaro postulas ĝin — kaj ke ni ne volas plu aŭdi nek legi pri reformoj, plibonigoj kaj ŝanĝoj : la tempo de la vanaj paroloj estas for, nun ni laboru kaj propagandu trankvile!

PAUL FRUICIER.

AVIZO GRAVA

Ni tre petas niajn kunlaborantojn kaj korespondantojn, ke ili bonvolu skribi *legeble*, formante tute la literojn, kaj *lasante almenaŭ unu centimetron inter ĉiu linio* por eblaj korektoj. Tio ĉi estas nepra kondiĉo por rapida presiĝo de la artikoloj.

LA REDAKCIO.

Gazetaro Esperantista.

The British Esperantist, majo. — Nekrologio de Ben Elmy. — Paco, poemo tradukita de Ben Elmy. — Dr^o A. Christen proponas, ke la anglaj esperantistoj vojaĝu kune por iri al Genève. — Raporto pri la alpreno de Esperanto de la Internacia Kongreso de Oficistoj. Dr^o Lambert paroladis en Esperanto. Akcepto estis farata de la Londona Klubo. — En Japanujo, en urbo Okayama, Sr^o Gauntlett instruas E. al 433 lernantoj, el kiuj 350 estas japanoj. Sekvas serio da adresoj de korespondemuloj. — Kroniko. Gramatika Kurseto. — Libraro kaj Gazetaro. — D. H. Lambert proponas la jenajn regulojn por esperantigo de klasikaj nomoj: 1^o al latinaj nomoj finiĝantaj per « us » kaj al grekaj finiĝantaj per « os » aldonu simple « o » al la radiko: Brutus, Bruto; Argos Argo (Kontraŭe, Argo liveros Argoo). Brutuso, Argoso, estus malbelaj. 2^o Por nomoj el la tria deklinacio, kiel Juno, Cicero, Venus prenu la akuzativan radikon kaj aldonu « o » (Junono, Cicerono, Venero). 3^o Kiam greka nomo havas latinigitan formon, uzu prefere tiun ĉi lastan, pli konatan. Ekz. Ciklopo, ne Kuklopo. Simile K devas esti anstataŭata per C antaŭ i, e, kiel en Circeo anstataŭ Kirkeo. 4^o Kiam greka nomo finiĝas per « eus », kiu estas unusilaba oni uzu la esperantan « eŭso » (Tezeŭso, Zeŭso). La duoblaj konsonantoj konserviĝu (Apolono, Kassio). 5^o Virinaj nomoj en « a » estu o-igataj simple, kiam ne estas konfuzo ebla kun viro; se estas konfuzo, tiam oni uzu « ino » (Julino, Portino). Virinaj nomoj en « e » alprenas « o » al sia e (Helleo). 6^o Diftongoj œ, æ, tradukiĝu per e (Cezaro). 7^o Y tradukiĝu per i (Olimpo). 8^o Al grekaj nomoj en « es, as, on » aldonu simple « o » (Herkuleso). — Dr^o Zamenhof, demandite ĉu oni povas uzi « ajn » kun la serio io, ia, k. t. p. respondis: « Jes! ĉar en Esperanto ĉiu vorto povas esti kombinata kun ĉiu alia ». La redakcio ne trovas, ke la majstro uzas ĝin alie ol kun kio, kia, k. t. p. — En la « Aldono » Leo Belmont tradukis la komencajn versojn de l'Ekleziasto. — Pastro Rust parolas pri Esperantigo de la Biblio (vidu L. I.). — D. H. Lambert tradukis versaĵon el Horacio. — Traduko el Letero de Dr^o Couturat presita en « die Zeit » (jam preparolita en L. I.). — Diversaj anekdotoj kaj rakontetoj.

Der deutsche Esperantist, majo. — Dr^o Mybs resumas la ĉefajn demandojn traktotajn en baldaŭa kunveno de esperantistoj germanaj en Braunschweig por fondi germanan societon. — Kroniko. — Bibliografio. — J. Borel tute prave plendas kontraŭ la nove bakitaj esperantistoj, kiuj volas fari versojn

antaŭ ol scii skribi korekte simplan leteron. Oni ne devas trouzi la apostrofon de l'o de la substantivoj nek de l'a de l'artikolo. Precipe oni ne povas tiel forstreki l'akuzativan n, l'adjektivan a, l'adverban e. Li finas per tiuj memorindaj vortoj: « Ni ne povas esti tro zorgemaj en la korekta uzado de nia bela lingvo; ni ne forgesu, ke la unuaj esperantistoj kreas iom post iom la definitivan stilon de la lingvo; el iliaj skribaĵoj, la venontaro ĉerpos siajn modelojn, ni do devas klopodi postlasi skribaĵojn tiel bonajn kaj korektajn, kiel ni nur povas ». — H. Strœle esperantigis pecon el Louis Veuillot « Dormemulo ». — Pripensoj pri la skribado de leteroj. — Humoraĵoj.

La Belga Sonorilo. — La Redakcio alvokas al la komercistaro, por ke ĝi enpresigu anoncojn en la esperantistaj gazetoj. — Jos. Jamin parolas pri « arboj, niaj amikoj ». — A. Grabowski tradukis fabelon el La Fontaine: « La korvo kaj la vulpo ». — Kroniko, sciigoj diversaj. Diversaĵoj. — Sintaksaj rimarkoj kaj ekzercoj. Diversaĵoj.

L'Espérantiste, marto. — L. de Beaufront finas sian artikolon pri la S. F. P. E. kaj ĝiaj grupoj. — Protokolo de l'kunsido de l'estraro de la Societo. — Novaj aliĝoj. — Kroniko. — Bibliografio. — Someraj Esperantistaj kolonioj. — La krukumo. — J. Evrot tradukis versaĵon el franca kanto « La testamento de Peĉjo ». — Internacia korespondado, amuzaĵoj, problemoj.

Esperantisten, marto. — Konrad Gutke parolas pri la divasteco de Esperanto ĉe la sveda sobrolaro. En la internacia kontraŭalkohola kongreso, okazonta en Stockholm en 1907, Esperanto estos unu el la permesataj lingvoj. La estro de l'internacia komitato de la bontemplanoj, Sro Wawrinsky, tre esperas, ke post tri jaroj Esperanto estos oficiale akceptita de la ĉiulandaj templanoj kiel internacia komprenilo. — Paul Nylén jetas rigardon al la stato de Esperanto en la diversaj landoj. — Alceste verkis versaĵon « Songo de Esperantisto ».

La Suno Hispana, aprilo. — Portreto de kapitano Inglada — La redakcio saĝe sciigas, ke ĝi ne enpresos la malbone skribitajn artikolojn. — Kroniko. — Bibliografio. — Anekdotoj diversaj. — Daŭrigo de la « kuracisto per batoj ».

Ruslanda Esperantisto, aprilo. — A. Saĥarov parolas pri la fratiĝo de popoloj. Oni devas krei internacian juĝistaron kun militistaro kaj polico por konservi la pacon. Aliparte oni devas enkonduki Esperanton en lernejojn anstataŭ la fremdaj lingvoj. — Al homaranoj estos sendata serio da rondirantoj. Pro Dombrowski parolas pri la alvoko de pastro Peltier al ĉiuj kristanoj por unuiĝo. La vojo kondukanta al tiu unuiĝo estas farebla, nur kondiĉe ke oni disvolu la koran kaj saĝan largecon de ĉiuj kaj ĝuste difinu la limojn de la tri precipaj

kristanaj principoj : eklezia aŭtoritato (katolika), kredesplora libereco (protestanta), nacieklezia sendependeco (ortokoksa). Tio ne estas neebla. — Du versaĵoj de Fez. — G. Kolowrat diras kelkajn vortojn pri la pariza Sorbonne. La aŭtoro finas sian artikolon per tiu kurioza opinio pri Francoj : « En Franclando la strata vivo superas la intiman eĉ en la Universitato ». Mi kredas, ke ĉiuj Francoj, kiuj legos tion, ekridetos. Ne, kara samideano vi eraras. Tio ŝajnas al vi, ĉar vi ne konas la veran intiman vivon de francoj, kiuj estas tre privatemaj kaj tre malfacile enlasas la fremdulojn en sian hejmon. — Kroniko. — E. Radvan Ripinski skribis kelkajn vortojn al mia adreso. Mi ne povas kontraŭstari la deziron ilin prezenti *in extenso* al miaj legantoj, kiuj povos per ili formi sian opinion pri tiu sinjoro, se nur ili memoras la aforismon de Buffon : « Le style, c'est l'homme ». Jen estas la afero. « En n^o 4 de ĵurn. L. I., sur la paĝo 118, kie estas citata n^o 1 de Rusl. Esper. por kur. jaro, la raportanto donas mirinde ŝatindajn kaj servemajn montrojn, kaj nome : Radripro por sia kroniko *ĉefe* uzas L. I. (?) kaj « Rusa Marseillaise » pres. en la dirita n^o de R. E., estas trad. de L. Belmont (?). Laŭ kutimo strange-malamika preskaŭ por ĉiuj esper. ĵurnaloj kaj pri kelkaj el ili tute silentanta kaj penanta ĉe tio ĉi sin eligi, eble laŭ la karaktera proverbo « sia ĉemizo ĉiam estas pli proksima al korpo », — ĵurn. L. I. restas al si fidela ankoraŭ rilate de R. E., sed, bedaŭrinde kaj kontraŭe ĝia, iom tro fiero, opinio pri si mem, la kroniko de L. I. ne estas ankoraŭ tiom riĉa kaj perfekta por servi kiel ĉefa fonto por esper-ĵurnaloj. Mi ĉerpas kronikon por R. E. el komunikoj de multaj niaj propraj korespondantoj kaj el plu, ol 20 ĵurnaloj kaj, lastokaze, laŭ freŝeco de sciigoj, mi preferas la francan gazeton Esperanto, sed ne L. I., kiu pro tiu povas tute trankviliĝi kaj, ĝuste, korekti la eraron pri tradukinto de Marseillaise, anstataŭiginte la nomon de Belmont per Vs. L. (Vzevolod Lojko) ». — Daŭrigo de Ruĝa Rido.

Tra la mondo, aprilo. — Rakonto de la aventuroj de unu el la ministoj eltiritaj el minejo apud Courrières post la tiea katastrofo. — G. Chavet klarigas la decimalan klasigon. Oni dividas la tutan homan scion en naŭ partojn, kaj ĉiu parto dividiĝas siavice en naŭ fakojn, k.t.p., laŭ arbitra maniero. Signante ĉiufoje ĉiun eron per unu cifero skribata dekstren de la antaŭaj pli ĝeneralaj, oni fine atingas serion en kiun oni povas enŝovi difinitajn verkojn. — K. Zacherl parolas pri la centjariĝo de reĝlando Bavarujo (3 kliŝoj). — S. Meyer verkis dialogon : « Milito kaj Paco ». — M. Finot parolas pri la japana bokso ĵiu-ĵitsu. Kelkaj kliŝoj montras diversajn farojn de tiu bokso. — Kroniko, bibliografio. — J. Meazzini prezentas foto-graĵon, sur kiu oni vidas konstruigon de galerio por la Milana Ekspozicio. — A. T. Simper daŭrigas klarigi la vivadon de teoplantisto en Hindujo. — A. Legoffre montras la kuriozan vidaĵon, kiun prezentas ŝipo por elmigrantoj, en Havro. —

G. Svačina prezentas junan boheman violoniston, Jaroslav Kocian. — Daŭrigo de « La Torento de ŝaŭno ».

Alĝeria Stelo, 20 marto, 5 kaj 20 aprilo. — Fino de « Dekkvin-aŭgusta ordenito » tradukita el Alph. Daudet de A. Baissac. — Fino de « la soldato ». — Grafo Gallois daŭrigas raportoj pri sia vojaĝo la okcidentafrikaj bordoj. Li parolas pri Konakri kaj la franca Gvineo. — A. Bézingé tradukis araban rakonton « Virina Ruzo ». — Fabelo: « La bestoj antaŭ Jupitero ». — Diverzaĵoj, kroniko, komunikaĵoj de la Algera Grupo. — Franca artikolo pri la katastrofo en Courrières.

Esperanta Ligilo, februaro. — Kroniko. — Versaĵo, « Renkonto de ŝipoj ». — Laŭ esploro de Afriko. — Simpla rakonto. — Humoraĵoj. — Daŭrigo de la parolado de Dr^o Zamenhof.

Marto. — Avizo. Problemo. — Letero el Bostono. — Humoraĵo. — Politika kroniko (Guilbeau). — Versaĵo: « Post la batalo » (Boirac). — Proverboj. — Fino de la parolado de Dr^o Zamenhof.

Antaŭen Esperantistoj, marto. — A. Bardoulet daŭrigas sian skizon pri Nova Kaledonio. — Deklaracio de la Perua Esperantista Societo. — Cirkulero de la centra oficejo. — Valoro de fianĉino, humoraĵo. Bibliografio, Kroniko. — Pri lernejoj kaj instruistoj en Bohemujo (F. Khun).

Esperanto hungara, februaro. — Ad. Altenburger tradukis literaturan priskribon de M. Jokai pri la « tuthungara » rivero Tibisko. — B. Kotzin daŭrigas paroli pri la sunforto. La suno estas 324-400-oble pli peza ol Tero. Estas malfacile imagi, kiom da forto eliĝas el la Suno. La parto de l'energio suna sendata al la tero estas nur $1/2735.000.000$ de la tuta energio suna. La plej konata efiko de l'suna energio estas la lumo. Por lumigi blankan paperon, tiel forte, kiel la suno, oni bezonas 100.000 normal-kandelojn je 1 metro. Sed la suno estas je 149.000.000 da kilometroj kaj la intensiveco de la lumo tra la spaco estas inverse proporcia je la kvadrato de l'interspaco. Krom tio, nia atmosfero disperdigas multe el la lumforto de la suno, ĉar sur altaj montoj oni trovas, ke la sunlumo valoras 288.000 normal-kandelojn. — N. P. Evstifeieff daŭrigas raportoj pri sia vojaĝo el Manĉurio Eŭropon. Alvenante en Moskvon, li vidis, ke grandega amaso da junuloj ĵetis sin al la revenantaj kun li oficiroj kaj forprenis iliajn armilojn. — Humoraĵoj, diversaj avizoj.

Unua Paŝo, aprilo. — H. Rjahowski verkis versaĵon « Malbenita tago ». — Eltiroj el la decidoj de la ĝenerala kongreso de la Makedona Revolucio Organizo. — J. Contencin tradukis versaĵon de Ramon de Godoy, « La Tapiŝo ». — Ento rakontas la kristaniĝon de l'bulgaroj. — Nikolov originale

verkis rakonton Enijo. — H. Rjahowki pensas, ke la panslavisma lingvo povas esti Esperanto. — Kroniko, diversaj avizoj,

La Revue de l'Esperanto, majo. — A. M. montras la rapidan divastiĝon de nia lingvo. Ni devas nun subteni la propagandon ĉe komercistoj, precipe hotelistoj. — Teksto de la leĝa propono de S^{ro} Lucien Cornet. — Ch. Reeve diras, ke la modo vojaĝi alilanden estas fortega; nun ekstarigas la modo havi Esperanton kiel pasporton. — Babilajo, de K. P. Sonas. — Versaĵo « al mia cigaredo » de A. Theis. — Sciigoj diversaj.

Espero Katolika, aprilo. — E. Peltier diras, ke la katolikoj devas esti la plej fervoraj pioniroj de Esperanto ĉar ili formas societon esence tutmondan. — K. Zacherl rememorigas pri la malkonsentoj inter Napoleono I^a kaj papo Pio VII^a. — Letero el Norvegujo, de Nils Ŭekland. — A. Dombrovski parolas pri la estonta ruseklezia ĝenerala konsiliĝo, kiu celas reformi la internajn malbonaĵojn de la eklezia vivo. Li diras, ke katolikoj devus imiti tiun ekzemplon. — Paĝo el « La Pensoj » de Pascal, kaj el la predikaĵoj de Lacordaire. — Unu libro monate: la civila edziĝo, de R. Lemaire. — La lasta Abencerajo, de Chateaubriand. — Revuo de la Revuoj Esperantaj.

Internacia Scienca Revuo, januaro, — C. Thiaucourt: parolado pri Esperanto. — A. de Romeu: la industrio de skrapantoj; la smirgo, la korundo, k. t. p. (trad. D^{ro} Vallienne). — E. Tarnovsky: la memmortigo kaj ĝiaj kaŭzoj (trad. B. Kotzin). — Heligo de la fotokopioj je arĝenta gelatena bromido. — Tekniko en servoj de filantropio. — Nutrado de la japana soldato. — Korespondado: samideano resumas la disputon pri la sufikso, « izi ». El la kontraŭuloj de tiu sufikso, unuj kredas, ke oni povus uzi la sufikson *ig*, aliaj la sufikson *um* por ludi tiun rolon. Tute videbla estas ke *origi* kaj *oriĝi ion* neniel estas la sama afero. Se oni uzas konstante *orumi*, *stani*, k. t. p., tio aldonas al la sufikso « um » difinitan senco apartan, precizan rolon, kio estas kontraŭa je ĝia gramatika malprecizeco. Same kiel « je » ne devas esti uzata anstataŭ aliaj prepozicioj, tiel « um » ne devas esti uzata kun preciza senco, por vortoj, kiuj formas difinitan klason. Kelkaj proponas uzi verbon komponitan per *ŝmiri*. Tio tute ne taŭgas praktike. Neniam grandegaj vortoj, kiel gelatenŝmiritaj platoj aŭ bikromatŝmirita gelateno eniros la komercan uzadon. Fine, kelkaj diras, ke la plej simpla estas devenigi la verbon rekte de la radiko kaj diri ekzemple « gelatenita, bikromatita ». Kaj ili alvokas la ekzemplon de analogaj verboj el la lingvo vulgara (sali. brosi, vaksi). Sed ĉu tiaj devenaĵoj estas pravaj kaj imitindaj? Mi pensas, ke ne, ĉar la verboj rekte devenantaj de substantivoj havas jam sufiĉe da aliaj sencoj (pri tio vidu historion de Lingvo Universala de Couturat kaj Leau). Sed, kio estas pli grava, la komuna uzado ne estas konsekvenca: se

oni diras « broso, brosi », oni diras kontraŭe « segi, segilo; remi, remilo », k.t.p., k.t.p.

Oni do devus diri ankaŭ brosililo, martelilo, k. s. Oni do ne rajtas diri, ke verbo rekte devenanta de substantivo signifas regule « agi per, ŝmiri per ». Oni devus kontraŭ korekti la multajn verbojn jam formitajn per « um » (kiel orumi, martelumi) kaj anstataŭe en ili « um » per « iz » (orizi, martelizi). Tiel la sufikso « um » restos libera por ĉiuj (jam sufiĉe multaj) kazoj nedifineblaj, neantaŭvideblaj, kiujn oni povas enirigi en nenian apartan klason. — Esperanto 10436 plendas, ke en multaj vortoj « internaciaj » oni uzas jen la fonetikan, jen la ortografian principon. Ekzemple, litero *t*, elparolata en iaj lingvoj kiel *c* aŭ *s*, jen restas senŝanĝe (dedukto, dezinfekto), jen estas anstataŭata de *c*, (abdukcio, generacio, fracio). Aliparte, en vortoj finiĝantaj per « io » ne estas necesa la duobligo de *i* en devenaĵoj (geografio, geografisto). Seno plendas, ke multaj aŭtoroj trouzas la afiksojn, precipe « ad » kaj « ek » kaj la kunmetitajn vortojn, kio faras la frazojn malfacile aŭ eĉ tute ne kompreneblaj. Li citas la vorton « eklumiĝadis », kie « ek » montras mallongan daŭron, kaj « ad » longan daŭron.

La Esperanta studento, marto. — Redaktora babilaĵo. — T. Gambier : Inteligento aŭ Instinkto? — La kritikisto. — Daŭrigo de la parolado de D^{ro} Zamenhof en Boulogne. — E. Drofenco : Miniaturo. — Rudyard Kipling : La fratoj de Mowgli (daŭrigo). — Paul Diffre : La ĉarmo de l'Esperanta studo. — Korespondado.

Espero pacifista, januaro-februaro. — J. Twombly diras, ke Japanoj batalis precipe por defendi la sendependecon. Krom tio ili absolute bezonis novan landon por sia tro multa loĝantaro. Tiel longe kiel Francujo gardos Algerion kaj Tunizion, Japanujo rajtos konservi Koreujon. — G. Moch respondas, ke la terkulturo ne estas sola vivrimedo por popolo. Eĉ se la loĝantara denseco de Japanujo estus dekobla, tio donus nenian rajton almiliti alian landon. Japanoj povas dediĉi sin al aliaj okupoj ol terkulturo; ili povas elmigri. Se la loĝantara denseco donus militan rajton, Eŭropo devus almiliti la amerikajn Unuigitajn Statojn, ĉar la Eŭropa denseco estas 37 kaj la Amerika nur 7. La fakto, ke Alsac-Loreno, Tunizio, Madagaskaro estas almilititaj, ne rajtigas aliajn almiliti novajn landojn. El la civilizacia vidpunkto tamen, la venko de la japanoj estis dezirinda. Sed ĉu la japanoj estis konsciaj batalantoj por la civilizacio, tion montros la estonto. Nun tia rezultato okazis en Rusujo, kie disfalas la oficistara tiraneco, kiu faris tiom da malbono. La Japanoj faris plej grandan servon al Rusujo. Aliflanke Hinujo estas savita el la « blanka danĝero ». Tio estas servo, kiun japanoj faris al la Eŭropanoj, ĉar tiuj ĉi per sia perfortado estis kreantaj la « flavan danĝeron » pri kiu oni diris multe da sensecaĵoj. Nun Eŭropanoj estos gardataj kon-

Sed la ĉefa celo de tiu dua cirkulero estas pritrakti la demandon de la organizado kaj funkciado de la komitato.

Solvi ĝin tuj definitive ne ŝajnis ebla. La L. K., tia kia ĝi eliris el la Bulonja Kongreso, estas esence provizora: estus do mallogika, se oni volus doni al ĝi de nun organizadon kaj funkciadon definitivajn; des pli ke la demando estas tre grava por la estonteco de Esperanto, kaj eraro okazinta pri ĝi tuj de la komenco povus havi por nia afero plej danĝerajn sekvojn. Tiel ekzemple spertado kaj pripensado eble inspiros deziron, ĉu malpligi la nombron de la komitatanoj, ĉu ilin proporcie dispartigi inter la diferencaj naciecoj laŭ novaj reguloj. Konvenas do ne enigi de nun la komitaton en tro rigidajn kadrojn.

Pro tiuj kaŭzoj, kaj ankaŭ pro la neebleco korespondadi sufiĉe facile kun vi, altestimata Majstro, dum la nuna tempo, mi sendigis al ĉiuj komitatanoj, per la helpo de la Centra Oficejo, ekzemplerojn de la provizora projekto, kiun mi jam submetis al vi, kiel fundamenton de esplora kaj prepara laborado, petante ke ili bonvolu ĝin ekzameni kaj resendi kun siaj rimarkoj, kritikoj, aldonoj, forigoj, k. t. p. « Eĉ vi povos » mi diris, « se vi juĝos bone, ĝin anstataŭigi per tute diferenca projekto, fondita ekzemple sur divido laŭ teknikaj specialecoj, aŭ sur aliaj principoj, kiu ŝajnos al vi preferinda. Vi povos ankaŭ, se tiel plaĉos al vi, vin turni al la projektoj jam prezentitaj al la Bulonja Kongreso. Mi esploros tiun aron da prokponoj kaj alŝanĝoj kaj mi faros pri ĝi raporton submetotan al la venonta Kongreso de Genevo post ekzameno de D^{ro} Zamenhof. »

Dume mi proponis la jenan metodon por konduki la laboradon de la komitato.

Pri ĉiuj demandoj al la L. K. resenditaj de la Bulonja Kongreso, aŭ senditaj ĉiutage de Esperantistoj petantaj klarigojn, aldonojn, reformojn, k. t. p., ŝajnis al mi, ke la plej praktika rimedo estos komisi ilian ekzamenon al raportonto elektita de la prezidanto, el la membroj de la L. K. kiu akceptos tiun taskon kaj poste komuniki la raporton al ĉiuj komitatanoj kun peto doni sian opinionon.

Tiun rimedon mi jam uzis por la demando pri la anstataŭigo de literoj sursignitaj en telegramoj resendita de la Bulonja Kongreso kaj la raporton mi komisiis al S^{ro} D^{ro} Javal.

Pri demandoj, kiujn la komitato povas propramove esplori, kiel ekzemple la difinado de kelkaj radikoj ĉu el Universal Vortaro, ĉu el pli novaj vortaroj, kies formoj aŭ sencoj ne estas sufiĉe certaj, mi sendis al ĉiuj komitatanoj tabelon kun peto, ke ili bonvolu resendi sian opinionon.

II. — Nun mi devas diri al vi, kiujn rezultatojn naskis

tiuj unuaj klopodoj. El la 99 membroj de la komitato, 69 resendis la demandaron kun respondoj pli malpli plenaj.

Le 30 mankantaj apartenas 2 al Britujo, 2 al Finlando, 7 al Francujo, 1 al Germanujo, 1 al Holando, 2 al Hungarujo, 1 al Italujo, nome Sr^o Blanc, kies demandaro revenis al la sendinto kun oficiala poŝta noto : « La adresato mortis » ; 1 al Japanujo, 2 al Kanado, 1 al Meksiklando, 1 al Norvegujo, 1 al Persujo, nome Sr^o Abesgus, kies demandaro ĵus revenis kun poŝta noto : « La adresato forloĝiĝis » kaj kiu loĝas nun en Rusujo, 1 al Polujo, 1 al Portugalujo, 3 al Rusujo, 1 al Svedujo, 2 al la Nordamerika Unuiĝo ; ĉu ili ne ricevis la dokumentojn al ili senditajn, ĉu iliaj respondoj erariĝis, ĉu pro ia ajn kaŭzo ili ne povis aŭ ne volis respondi ? Cetere mi provos denove ilin atingi por definitive scii, ĉu la komitato povas konfidi je ilia estonta kunlaborado.

El la respondintaj, unu jam bedaŭrinde mortis, Sr^o Achille Motteau, kiu apartenis al Britujo, kaj faris jam grandegajn servojn al nia afero.

Kvar (4) malakceptis esti membroj de la komitato, nome Kapitano Lemaire el Belgujo, Coutinho el Brazilujo, Midthus, el Norvegujo, kiu troviĝante tre danĝere malsana, proponas kiel anstataŭonton ĉu Sr^{on} Ald. Johnsen, stud. bur., el Christiania, ĉu Sr^{on} Nils Ŭekland, instruiston, Skaare Haugesund ; fine Ostrovski el Rusujo, kiu petas, ke oni anstataŭigu lin per iu alia pli agema samideano rusa.

Du (2) aliaj, t. e. Oreŝkov el Bulgarujo, kaj Méray el Francujo, kvankam ne rifuzante sian enskribon, certigas tamen, ke ili povos neniel partopreni la laborojn de la komitato.

Unu, Sr^o Bicknell, el Italujo, akceptas nur provizore, ĉar ne estante Italo sed nur loĝanto en Italujo, li kredas, ke li vere havas ne la rajton riprezenti Italujon.

Fine, unu, Sr^o de Beaufront, el Francujo, kiu kredeble ne ricevis aŭ ne sufiĉe atentis mian duan cirkuleron, al la demando ĉu li akceptas la enskribon de sia nomo en la L. K. respondas : « Jes, se la L. K. konservos la karakteron de konsiliĝo, de sekretario lingva por Zamenhof, kiel volis la Kongreso, sed se oni aliformigos ĝin en alivestitan Akademion, kie la blinda plimulto da voĉoj regos kaj decidos flanke de Zamenhof kaj eĉ okaze kontraŭ li, ne, mil fojojn ne ! »

Pri la projektoj de organizado kaj funkciado de la L. K., mi ne ricevis ankoraŭ sufiĉe multajn respondojn por fari al vi utilan respondon. Cetere la afero postulas longan kaj seriozan konsideradon.

Mi esperas, ke mi povos baldaŭ raporti al vi pri la ceteraj laboroj de la komitato, nome pri la literoj sursignitaj.

Atendante vian aprobon kaj viajn konsilojn, mi petas vin akcepti, altestimata Majstro, la sinceran esprimon de nia respekto plena sindonemo.

E. BOIRAC,
Prezidanto de la Lingva Komitato.

ESPERANTO KAJ RUĜA-KRUCO

Tre grava broŝuro, kiu kredeble estos tre bona propagandilo por Esperanto ĉe la eŭropaj militistaro, maristaro, medicinaro, ruĝa-krucanaro estas tre baldaŭ aperont a subtitolo *Esperanto kaj Ruĝa-Kruco*.

Jen ĝia plano :

Montrante la necesecon de lingvo internacia por la komerco, industrio, turismo, k. t. p., la aŭtoro entreprenas ĝian utilecon por la armeoj, maristaroj kaj speciale la servoj de la Ruĝa-Kruco.

Tiuj lastaj partoj estas tre dokumentitaj.

Poste, li difinas Esperanton kaj elmetas tre plene la regulojn kaj principojn de la lingvo.

Fine : militistaj, maristaj, kuracistaj, ĥirurgaj, k. t. p., esprimoj; la Interkonsento de Genevo, la Deklaracio de Zamenhof kaj vortaro igas tre grava tiun verkon kaj ebligas la lernadon de Esperanto por iu ajn, kiu devus militiri.

Jen la letero, kiun adresis Doktoro Zamenhof al la aŭtoro, Leŭtenanto Bayol, instruisto ĉe la speciala lernejo de Saint-Cyr (Seine-et-Oise) *Francujo*.

Varsovio 4/III 06.

Kara Sinjoro,

Vian laboradon por la akcepto de Esperanto ĉe la Ruĝa Kruco mi trovas tre grava kaj mi deziras al vi la plej bonan sukceson.

La Ruĝa-Kruco apartenas al tiuj institucioj, kiuj la plej multe bezonas iun facile ellerneblan komunan lingvon, Ĉar se aliaj institucioj nur *iafoje* havas aferojn kun malsamlingvuloj, kaj lasas la eblon serĉi tradukanton, la Ruĝa-Kruco preskaŭ ĉiam koncernas alilingvulojn kaj postulas kompreniĝadon *tujan*.

La noblaj laboroj de la Ruĝa-Kruco sur la kampo de batalo ofte perdas ĉiun valoron nur pro tio, ke la savanto kaj savato sin reciproke ne komprenas.

Se vi sukcesos iam atingi la interkonsenton de la registaroj ke la soldato ironta en la militon lernu la plej gravajn vortojn de lingvo internacia, tiam vi povos diri, ke vi forprenis de la militoj grandan

parton de ilia krueleco, kaj vi donis al la Ruĝa-Kruco ĝian efektivan valoron.

Via ZAMENHOF.

Sinjoro Moynier, Prezidanto de l'komitato internacia de la Ruĝa-Kruco elmontris sian simpatian por Esperanto, ĉar li plezurege akceptis la dediĉon de tiu verko : grava afero pro lia granda influo en la naciaj societoj !

Jam la komitato havas multajn skribaĵojn pri Esperanto, kaj tre certe, la lingvo Zamenhofs estas diskutata ĉe la internacia konferenco de la Ruĝa-Kruco okazonta en Londono, la proksiman jaron 1907.

Do ni uzu nian tutan influon apud niaj naciaj societoj por ke la verda stelo de Esperanto kaj la ruĝa kruco de Genevo estu interligitaj.

Tiel la nomoj de du grandaj bonfaristoj de Homaro kunigos : Doktoro Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo kiu fratigos la homojn ; kaj Prezidanto Moynier, la iniciatoro de l'Interkonsento de Genevo kiun plibonigis kaj pli kaj plibonigos la sorton de bravuloj falantaj vunditoj, apud ilia nacia flago !

Opinio

Ni ricevis la sekvantan leteron :

En la N^o 3 de « *Rusl. Esper.* » estas presita « Malfermita letero al ĉiuj S^{roj} Redaktoroj de Esper. Gazetaro », subskribita de la Redakcio. Ni — literaturaj kunlaborantoj de Esper. gazetoj, — volas diri kelke da vortoj pri la letero, kiu, laŭ nia opinio, ne respondas al la deziroj de multaj rusaj esperantistoj.

« R. E. » sin turnante al ĉiuj redaktoroj interalie skribas : « La reganta nun reakcio en Rusujo kaj Polujo estas tiom kruela kaj senkompata, ke ni, gardante nian karan ideon kaj zorgadon pri ĝia sukceso, ne trovas nun povebla submeti je risko nian Esper. aferon kaj daŭrigi la presadon de social-politika fako en « R. E. ». Estas nature, ke la presado aŭ ne presado de ia fako dependas de la Redakcio kaj ni ne pretendas ian kritikon aŭ edifon. Ni nur opinias, ke la « kara ideo » ne devas timi la plej kruelan reakcion ; nenio en la mondo sufokos nian ideon ; neniam ni forgesos ĝin kaj ĉiam adoros. Ju pli kruele ia ideo estas persekutata, des pli varmege ĝi estas amata ! La oficiala organo de S-to « Espero » preferas *submeti je reakcio Esper. aferon, timante ĝin » submeti je risko* ». Tial ni dubas pri la sukceso, ĉar la « kara ideo » estas tro severe « gardata » kontraŭ... sukcesoj ! Ni ja memoru, ke Esper. gazeto politike-indiferenta aŭ neŭtra nun ne povas ekzisti en nia lando, ĉar la popolo ĉion rigardas tra politika vitro de partio dank' al la revolucia epoko. « R. E. » en komenco

komprenis la momenton sed de la 3 bedaŭrinde ŝanĝis la konduton... Tamen ni ne riproĉas, ni nur rekomendas, konsilas...

Cetere, ni ĉefe celas la sekvantajn liniojn de la letero : « la 8 N^o de Tra la Mondo estis ricevita en Ruslando sen la unua paĝo (1), kie estis enpresitaj tri fotografaĵoj el revolucia vivo en Rusujo kun klariga teksto de D^{ro} Morgan. Tial (!!) ni humile petas niajn kolegojn prokrasti la presadon de skizoj el politika rusa movado ĝis pli favora tempo ». Ni kontraŭdiras : la furioza cenzuro bruligu paĝojn de Esper. gazetoj ; ni, rusoj, tute egale ne bezonas skizojn kaj fotografaĵojn el nia revolucia vivo, ĉar... ni estas rusoj ; la alilandanoj legu ilin...

Ni komprenas, ke « R. E. » pro la cenzuro ne povas enpresiti politikajn artikolojn. Ni komprenas, ke « R. E. » estas minacata per severaj punoj. Sed ni ne komprenas, ni malkomprenas, kial « R. E. » petas *liberajn gazetajn eksterlandajn*, ke ili ankaŭ prokrastu artikolojn pri rusa politiko? Kial fari komplezon (*certe kontraŭvolan*) al la reakcio? Kial?

Ni laŭte protestas kaj nin turnas al la Redaktoroj de Esper. Gazetaro : *ĉar rusa Esper. organo nun ne havas la eblon lumigi rusajn aferojn, ni petas vin, karaj kolegoj, ke vi enpresigu detalajn artikolojn pri la stato de nia lando. La tutmondo sciigu pri la heroa batalado de rusa popolo ! La tutmondo indignu kaj kondamnu la kulpulojn de nia suferado ! La esperantistaro internacia almenaŭ spirite helpu kaj kuraĝigu la rusajn samideanojn !*

Boriso Kotzin kaj Vl. Dembo.

Esper. Gazetoj estas petataj represii.

Ni Varbu maristojn

En la *Revue de l'Esperanto* S^{ro} Duchochois iniciatis movadon esperantistan ĉe la maristoj : tre utila ja estos la disvastiĝo de esperanto inter ili ; tiam kiam ni, teranoj estas kvazaŭ najlataj sur nia lando, kaj pro tio malebligataj komuniki parole kun la fremduloj, koni palpe la progresojn de niaj grupoj, al ili la maristoj tramigrante ĉiujn marojn, vizitante multajn havenojn, povas montri al la ĉiunaciaj grupoj ne diskuteblajn pruvojn de la taŭgeco kaj de la tutmondaj progresoj de Esperanto.

Bedaŭrinde, Esperanto ne ankoraŭ multe sukcesis eniĝi la maristaron. En tiu ĉi artikolo mi proponas ke aparta komisiitaro en la Geneva Kongreso sin okupu je la rimedoj por organizi propagandon kiel eble plej internacian.

Por tion faciligi, mi petas ke ĉiuj personoj interesigantaj je la maraĵoj faru skribe projektojn de la rimedoj kiujn ili kredas plej efikaj, kaj ke ili sendu al mi, kiel eble plej baldaŭ siajn skribaĵojn. Mi faros raporton pri ili, preparante tiumaniere la

(1) Mi ricevis la 8an n-ron sen iaj difektoj.

laboron de la esperantistoj, kiuj partoprenos en la kongresa komisiitaro.

En la sama celo, ne forgesante, ke la aŭtoritatargumento estas tre grava por konsiderigi nian aferon, ĉiuj devas serĉi, tuj de nun, eminentajn maristojn, ĉu komercajn, ĉu militajn kiuj akceptus ke iliaj nomoj estos subskribataj sub propaganda cirkularo internacia, sendota al la ĉefaj militŝipoj kaj kuriersĝipoj; tiuj nomoj estos kunigataj dum la kongreso, kaj la cirkularo redaktata.



Aliparte, jam de unu aro, mi penas por fari enketon pri marista afero, kaj mi ĝis nun ne sukcesis, kredeble pro la manko da sufiĉa reklamo. Nun en Francujo oni sin okupas tre aktive pri la instruado de la marŝipestroj, kaj oni estas ŝanĝanta la programojn de tiu instruado. Ni volus scii kiamaniere tiu instruado estas kondukata ekster Francujo en ĉiuj nacioj. Poste mi tradukos la enketon en grava nacia revuo, montrante insistegan devenon: tio estos bonega propagandilo en la ĝusta tempo.

Ĉiu helpu min! Oni ne timu ke mi ricevos tro multe da respondoj, ĉar tiamaniere mi eble ne ricevos eĉ unu.

Petu demandaron de Sro René Mesny, 5, Rampe, Brest (Francujo).

René MESNY.

Profesoro de hidrografio, eksmaroficiro.

Por la francaj militistoj esperantistaj.

Mi estas tre feliĉa profitigi miajn Kamaradojn per bonega korekto farita al mi de unu el plej eminentaj esperantistoj, franca eksoficiro:

« Permesu al mi la korekton jenan pri la nommaniero
« *Mia komandanto*, kiu estas duobla galicismo.

« 1^e La rango de *Komandanto* estas ĉie dirata *Majoro*;
« eĉ en la lingvo franca, la vorto *Komandanto* estas aplikata
« kelkafoje tute alie — (ekzemple, ĉe la maristaro, kaj en la
« esprimo *Kapitano-komandanto*).

« 2^e La « *Mia* » esprimo de respekto estas tute franca.
« Mi kredas, ke nenia fremdulo komprenas. « *Mia komandanto* »
« kaj estas necese skribi « *Sinjur Majoro* ».

SINDONEMULO.

II^a Universala Kongreso de Esperanto

La Loka Organiza Komitato petas la personojn kiuj intencas sin enskribigi kiel membroj de la Kongreso, NE PROKRASTI

TION FARI, kaj ne atendi la lastan momenton por sendi sian aliĝon.

Ili tiel tre faciligos la taskon de l'Komitato, kaj la laboron de la oficistoj.

La Loka Organiza Komitato.

LASTE APERINTAJ VERKOJ

Eldonoj de la Presa Societo.

Katalogo ĝenerala de la Esperantaj eldonaĵoj nun aĉeteblaj (15 cmj). — En tiu 48-paĝa broŝuro estas montrataj ĉiuj verkoj, libroj, broŝuroj, ktp., en aŭ pri Esperanto, nun aĉeteblaj. La prezoj estas markitaj kun kaj sen la sendelspezo. La ĉefaj verkoj estas mallonge analizataj. — En dua parto estas montrataj la gazetoj nun aperantaj, la poŝtkartoj, muzikaĵoj, eldonetoj diversaj. Fine, sciigoj pri la maniero sendi monon laŭ la diversaj landoj finas la broŝuron, kiu certe estos favore akceptata de la Esperantistoj. Kompreneble, ĝi estas ankoraŭ nur unua provo de tute detala kaj plena katalogo de nia literaturo, sed espereble ĝi perfektigos kun la venontaj eldonoj.

Internacia Korespondado Esperanta, kolekto da adresoj de korespondemaj Esperantistoj. Tiu ĉi broŝuro 94-paĝa (1 fr. 25) estas kolektita de S^{ro} de Beaufront el la adresoj ĝis nun publikigitaj en la gazeto L'Espérantiste, kaj kelkaj aliaj. Oni trovas en ĝi adreson de 600 Esperantistoj kun klarigoj pri la temo de la korespondado, tabelon laŭ temoj de korespondado, tabelon laŭ landoj de korespondantoj, nomaron de tiuj Esperantistoj kiuj havas la « ateston pri kapableco » de la S. F. P. E., nomaron de Societoj Esperantistaj, gazetoj, ktp. Estas dezirinde, ke ĉiuj korespondantaj Esperantistoj sendu sian adreson kaj montru la mankojn aŭ erarojn de la broŝuro, por ke la venontaj eldonoj estu kiel eble plej bonaj.

Grand Dictionnaire Français-Esperanto. — Eliris el la presejo kajero entenanta la vortojn inter admirer kaj alerte.

La Pastro de Pompono, malnova franca kanteto (humoraĵa) de Collé, Esperantigita de G. Chavet; ario aranĝita de F. de Ménil. Tiu kanteto estos certe ŝatata en la Esperantistaj festoj. (1 fr.).

Au Congrès de Boulogne. chanson composée par G. Chavet sur l'air du « Curé de Pomponne » (0 fr. 50). Amuzanta humoraĵo franclingva pri la Boulogne'a Kongreso.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lasépède, Paris

Administrantaro Th. Cart, prezidanto; Paul Fruictier, Ch. Vérax, deleg.;
Pro Benoit, Dr^o Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. V. Chaussegros. Teknika direktoro : Lengyel Pál.

L'Imprimeur-gérant : P. Fruictier.

A. V. Aleksandrov, *Jalta, Ruslando*, deziras korespondadi per leteroj aŭ ilust. poŝtk., kun neeŭropaj geesperantistoj.

Enigmo

En lando naskiĝas mirakla likvoro :
La Dioj favoris per ĝi la homaron.
Ĝi tute similas fandaĵon el oro
Kaj eĉ ĵaluzigus la sunradiaron.

Verŝite sur ondojn ŝvelintajn pro vento,
Ĝi tuj kvietigas la ŝaŭmon de l'maro :
La flava likvoro en unu momento
Konservas la vivon de la maristaro.

Per ĝi sin frotadis l'antikvaj atletoj
Por iĝi pli fortaj en la batalado.
La pastroj ĝin ĉerpas el orboteletoj
Por krei novpastrojn per sankta ŝmirado.

Ĝi al ni ĉefverkojn pentradajn liveras
Kaj eĉ pli ol unu ĉefverkon bongustan
En la kuirado. — Mi tion esperas,
Vi trovis la vorton respondan kaj ĝustan !

Sed pluajn klarigojn vi eble deziras :
« En kiu mistera planedo aŭ stelo
Ni tian likvoron eltrovos, vi diras,
En kiu edeno, en kiu ĉielo ?

Se ne en ĉielo, en kiu terparto ? »
— Sinjor' LANISSON, de Salon, en Franclando,
Tuj post la ricevo de simpla poŝtkarto
Rapidus respondi al via demando.

Grava avizo.

La divenintoj de la ĵus proponita enigmo ricevos grandvalorajn premiojn. Al ĉiu el ili mi donacos po unu specimeno de miaj bonegaj Provencujaj produktaĵoj (olivoj, olivoleoj, sapoj, ktp.) kun unu beleta cirkulero presita en Esperanto ; kaj, se miaj komercaĵoj plaĉos, po unu *tre interesa fakturo Esperanta*.

Oni sendu la solvon de l'enigmo, la diversajn petojn kaj la mendojn al S-ro **Lanisson**, en **Salon** (*Provence*) **Francujo**.

EINAR HÅKANSSON el *Södertelge* (Svedujo)
ŝanĝis sian adreson, kiu nun estas: Hôtel des Arènes,
25, Rue Lacépède, Paris V, (Francujo).

Gazetoj Esperantistaj

L'Espérantiste, oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de Esperanto, 24 paĝoj (formato 15 × 20) da teksto franco-Esperanta aŭ nur Esperanta, 8 paĝoj kovrilaj (nomaroj de Esperantaj verkoj kaj de ĉiuj grupoj de la S. f. p. E.); *Internacia Korespondado Esperanta* senpage disponebla por la abonantoj — 3 fr. 50. *Jarabono* (1-a de januaro, aprilo, julio, oktobro) en *Francujo* : 3 fr, *ekster Francujo* : 3 fr. 50 ; kun enskribo en la francan Societon 4 fr. ĉie. — Adreso de l' administracio : *Louviers* (Eure) France.

Espero Katolika, 32-paĝa revuo monata tute en Esperanto, malfermata por ĉiuj. Rakontoj, artikoloj pri nuntempaj aferoj, ŝakoj, k. c. Jare : 5 fr. (en Franclando 4 fr.) Presejo A. BARBOT, 15, rue Etienne Pallu, *Tours* (France).

Espero Pacifista, monata organo de l'*Internacia Societo Esperantista por la Paco* (krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas enskribitaj kiel aliĝantoj al la Societo). — Jara abono (aŭ minimuma kotizo) : 5 frankoj. La Societo akceptas ankaŭ opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (France).

Germana Esperantisto, organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata germane kaj esperante. Jara abono 4 frankoj. Administracio kaj Redakcio Esperanto Verlag, MÖLLER & BOREL, *Berlin, S.*, 95, Prinzenstrasse.

The British Esperantist, oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono, 2 fr.). — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13 Arundel Street, Strand, London.

Tra la Mondo, tutmonda multilustrata revuo monata, tute en Esperanto. — Nuntempaĵoj, Pri Esperanto, Arto kaj Literaturo, Sciencoj, Komercio kaj Industrio, Militistaro, Maristaro, Teatro, Sportoj, Virina kaj Gejunula paĝo, Felietono, Konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l'landoj aludataj. — Jare 8 frankoj ; kvaronjare, 2 fr. 25. — Redakcio : S-ro MONTROSIER, 8bis, rue de l'Ecu d'Or, *Orléans* ; Administracio : 15, Boulevard des deux Gares, *Meudon* (S.-et-O.) France.

La Belga Sonorilo, organo de la Belga Ligo Esperantista. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata france, flandre kaj esperante. Jara abono : 4 frankoj. — Redaktoro-administranto, al kiu oni ĉion sendu : J. COOX, *Duffel*, Belgique

Internacia Revuo Medicina, monata organo por praktika medicino, redaktata en Esperanto kaj diversaj lingvoj naciaj, de diverslandaj kuracistoj. Celas ne nur la Esperantan, sed ankaŭ la kuracistan utilon. Jara abono : 7 fr. (en Franclando 6 frankoj. PARIS, 33, rue Lacépède.

Esperanta Ligilo, ĉiumonata revuo, TH. CART, ĉefredaktoro, 12, rue Soufflot, Paris V — Abonkosto : 3 fr. jare. Dua jaro (1905), n-ro 5—6 (septembro-novembro).

Esperanto, scienca kaj literatura ilustrita monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.

La jaran abonpagon (4 fr.) sendu al la redaktoro MARICH ÁGOSTON, Papnövelde-utcza 6, Budapest, IV, (Hungarujo).

Ruslanda Esperantisto, ĉiumonata organo de la Societo « Espero » en Esperanto kaj parte en rusa lingvo. — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo : artikoloj pri la problemo de lingvo internacia kaj pri Esperanto ; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio ; social-politika fako ; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estas presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj multaj aliaj. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj senpage. — Adreso : Ruslando, St.-Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, la Societo « Espero ». — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la Societon) 3 rubloj (7 fr. 50).

Juna Esperantisto, ilustrata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. Eliras monate. Literaturaĵoj, teatraĵoj, karikaturoj. Jara abono 2 fr. 50. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpreso estas senpaga ; ĉiu nova enpreso kostas 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — Presa Esperantista Societo, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

Glasgow, 137, Weet Regent Street, — Tabaka Sindikato Esperantista. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ».
— Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

Barcelono (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — Johano Rosals, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

Valence d'Agen (France), — Alfred Gérin, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula* deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

London, Anglujo. *Adair & Co*, 39, Victoria Street, Westminster, entreprenas komercajn komisionojn, kaj la adresadon kaj ekspedon de komercaj cirkuleroj, prezaroj kaj specimenoj.

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto

kun la konstanta kunlaborado

de D-ro L. L. Zamenhof.

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estas pure literatura; ĝi enhavas: novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povas naski disputojn, estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1-a numero aperos la 1-an de septembro 1906, okaze de la II-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kosto : ĉiu numero **0 fr. 50**

jara abono **6 fr.**

ONI POVAS DE NUN ABONI

ĉe la Librejo **HACHETTE kaj K-o,**

79, Boulevard Saint-Germain, Paris.

Preso Esperantista Societo, 33 rue, Lacépède, Paris.

